Esperanto
(1985)
V- 19563/[7]





# LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

*Trimonata Revuo*

*Redakcio: Bamblev 2, N 3700 Skien*


NE ISSN 0037-6558

N-ro 1/1985 Unua jarkvarono 1985



# NOVA JARO NOVAJ EBLECOJ

Mi scias - same bone, eble pli bone, kiel vi ĉiuj, ke nia Ligo ne estas inter la plej fortaj movadoj de la mondo, eĉ de la esperantomovado. Ofte oni sentas emon rezigni - pro manko de pozitivaj signoj al efika kunlaboro kun skoltmovado aŭ esperantomovado, jes eĉ de bonvolo.
Tamen - ni sciu, ke ni posedas plej fortajn rimedojn al progreso, se ni vere ekuzas ilin. Kaj ĉiu opa el niaj membroj havas tiujn rimedojn! "Mi provis ĉiel, sed mi ne sukcesas persvadi iun kaj fidi al esperanto", vi eble diras. Kaj mi kredas ĉion, escepte de la vorto "ĉiel". Vi certe rakontis pri esperanto, pri nia ideo, pri la facila gramatiko kaj la mondvasta uzo. Kaj jen vi staras tie kune kun iu, kiu jam lernis iom el fremdlingvo en la lernejo, kaj kies demando estas: Kial mi uzu libertempon por lerni ion, kio eble donos



# S-E-L

SKOLTA ESPERANTO LIGO
Postbus 433
1500 EK Zaandam Nederlando
Poŝtĝirkonto 54 36 47
*****************

Fondita 1918
Fondinto "Avoto" A W Thomson.
Kunfondinto: J W Leslie.

Honoraj Prezidantoj:
D H Davis, L J VanGulck
*****************

Ĝenerala sekretario: J K Hammer, Taxusstraat 7, 1505 AA Zaandam, Nederlando. Telefono: 075-16 69 31.

Kasisto kaj adminstranto de "La Skolta Mondo": D H Withey, 21 Brookfield Ave, Waterloo, Liverpool L 22 3ye, Britujo. Telefono: 051 928 2936.

Redaktoro: Hans Amund Rosbach, Bambleveien 2, 3700 Skien, Norvegujo. Tel: 035-21 8 48. Poŝtkonto 3 36 33 89.

# salajro

Kompreneble mi ĉiam serĉas posteulon en la redakta seĝo de LSM. Jam tro longe mi sidis en ĝi - kiel ajn oni rigardas tion, el vidvinklo de SEL aŭ de mia pravata vivo. Kaj multaj miras, kiam mi rakontas pri tiu stranga kromlaboro kiun mi havas: redakti malgrandan kaj sensignifan gazeton en lingvo "kiun neniu parolas" ktp - kaj eĉ sensalajre.
Kaj - ili diras: Kiel vi povas imagi, ke vi trovos iam same naivan posteulon, kiu pretas akcepti tiajn kondiĉojn?
Tial mi deziras skribi kelkajn vortojn pri mia salajro kiel redaktoro de LSM:
De tempo al tempo mi ricevas leteron de iu leganto - komentario al io kio estis en la gazeto. Tio estas parto de la salajro: Via laboro ne estas vana - kelkiuj legas ĝin, eĉ kun tia intereso, ke ĝi kreas kritikan (positvan aŭ negativan) leteron!
Radio Zagreb trovis lokon por mencio de nia organo, vidis ĝin sufiĉe valora por tio!
Kelkfoje la leteroj estas bele afrankitaj - tio kompreneble kreas ĝojon al malnova kolektanto. Kaj impreson kiam mi montras al skeptikuloj kian mondvastan uzon Esperanto tamen havas.
Sur la muro pendas kadro kun diversaj pli-malpli belaj insignoj kaj aliaj aĵoj kiujn sendis al mi legantoj, i.a. diversnaciaj skoltinsignoj. Belaj rememoraĵoj. Kune kun tio bumerango, kiun mi iam ricevis el Ameriko kaj poluritan ŝtonon kiun mi ricevis el Usono.
Jes - la salajro estas granda, ne kiel mona valoro, sed kiel signoj ke homoj povas esti amikoj trans ĉiuj kaj ĉiaj limoj.
Dankon!

Hans Amund



## NOVA JARO NOVAJ EBLECOJ

samajn eblecojn kiajn mi jam havas.
Tial la unua tasko ne estas propagandi nian lingvon. Anstataŭe vi montru rezultojn el via esperanto-vivo: Poŝtmarkojn ĉialandajn, skoltinsignojn el la tuta mondo, alumetskatolojn, monerojn - ĉio ajn eblas. Vi rakontu en la roto pri ideoj, kiujn uzas roto en tiu aŭ tiu fremda lando, vi montru bildojn - ĉiel vi povas krei la scivolemon de la aliaj: "Kiel vi havigis al vi ĉion ĉi?" Kaj **tiam** vi povas rakonti pri SEL kaj Esperanto.

Via nuna demando eble estas tiu ĉi: "Kion mi montri? Mi ja ne posedas ion montrindan." Se vi tiel diras aŭ pensas, sciu, ke vi mem ne uzis la eblecojn, kiujn donas la internacia lingvo al vi, kaj vi eĉ malhelpis al iu alia trovi tiujn trezorojn kiujn promesas la esperantomovado. En tiu ĉi numero de LSM estas tuta paĝo kun korespondderizoj. Kaj ĉiu el tiuj kiuj petas korespondon havas deziron pri respondo - de vi! Havas deziron ekhavi precize kion mi priskribis: Unikan kolektaĵon de tiaj malmultekostaj, sed tamen valoraj, aĵoj el fremdaj landoj. Kaj ĉiu el ili sidos kun malespero kaj disiluziiĝo kiam li/ŝi ne ricevas eĉu unu respondon post sia anonco!




## Faru vian devon


Jen malgranda - kaj timiga - ero el la skolta leĝo. Devo - bona ago - ni konas la vortojn sed ankaŭ ofte aŭdas iun diri "Tio ĉi ne estas skolta klubo" aŭ ion similan kun nekaŝita moka tono. La "bonaj agoj" estas ia ludo, dum tio pri kio ni nin okupas estas serioza afero! Sed la bonaj agoj tamen estas konstruŝtonoj por la mondo! Pli malfacile estas por tiu - skolto aŭ neskolto, infano aŭ plenkreskulo - kiu ekvidas ke li ne faris sian devon, ke ŝi ne faris la bonan agon.



Restas por li/ŝi - jes, por ni ĉiuj la eldiro de la evangelio, de la bona mesaĝo, ke tiu, kiu vidas sian "pekon" kaj petas pro ĝi pardonon, ankaŭ ricevas pardonon.
Inter la "devoj" estas devo al Dio: Preĝi - kaj ricevis pardonon.

# sunhorloĝo




Faru mem vian sunhorloĝon! Por tiu projekto vi povas uzi fortikan kartonon, sed pli bone travideblan plaston. Vi unue desegnu la krucon, kie AD = 36 cm, DC = DB = 18 cm. Signoj por ĉiu horo je ĉiu 3 cm. C - 70° = 4 cm, C - 60° = 6 cm.
Poste vi faras el la kruco "globon". La kvar punktoj A estu kune fiksataj. La globon vi fiksas al ligno tute horizontala per najlo tra la signo, kiu montras vian latitudon. (La 60° kaj 70° devenas, ke la desegnaĵon ni trovis en norvega skolta Ĵurnalo, sed vi certe mem aŭ kun helpo de alia persono povas kalkuli kie via "propra" signo estu). Inter la punktoj B kaj C metu ŝtaldraton. Kiam vi turnas la sunhorloĝon tiel ke C-B montras al la nordo (geografia nordo!), la ombro de la drato montras la tempon.
Eble via lando havas/havos "someran tempon"? Tiukaze vi justigu la horloĝon sammaniere kiel vi justigas vian surbrakan horloĝon.



# Nordlanda tendaro por roveroj




Vässarö, insulo kun bela naturo 12o km norde de Stokholmo en Svedujo estis la loko de la granda evento por roveroj en 1984:

NORDSTING - 84.

La tendaro estis aranĝita dum la tagoj 22.a - 30.a de julio 1984. La 491 partoprenantoj venis el ĉiuj landoj en "Norden", kaj ili travivis neforgeseblan semajnon en la tendaro.

La partoprenantoj dividiĝis en grupojn sendepende de landlimoj, kaj ĉiu grupo partoprenis du aktivecojn dum la tendara tempo. La aktivecoj tre diferencis, kaj povis ampleksi preskaù ĉion de supervivo ĝis gazetfarado, ekologio kaj naturmedia gardo.

En la tendaro estas ankaù multaj aliaj aktivecoj. Oni aranĝis turniron de "volley ball" kaj organizis samban orkestron. Unu el la grupoj eĉ faris malgrandan internordan vortaron. Vespere fariĝis kampfajro kun diversaj distraĵoj.

Multaj partoprenantoj ne ŝatis la "limpa"n, t.e. la sukeritan svedan panon, kiun oni prezentis. Dum la lasta komuna kampfajro 4 norvegaj roveroj saltleviĝis kaj kantis protestan kanzonon kontraù la "limpa". Ili ankaù metis "limpa"n sur la kampfajron, kiu tuj estingiĝis. "Sovaĝa ĝojkriado!"
Frunokte oni ofte vizitis la tendaran kafejon "Cafe Grafitti". Ĝi estis malfermita tiel longe kiel ekzistis maldormaj roveroj. La kafejo situis en du militist-tendoj, kaj tie oni ege amuziĝis per kantado, gitarludado, kafotrinkado kaj tiel plu.


Simile al aliaj amuzaj tendaroj ankaù NORDSTING -84 tro rapide finiĝis. Sed post tri jaroj, en 1987, oni denove aranĝos Nordlandan tendaron por roveroj, aù en Finnlando aù en Norvegujo.

Ĝis revido tiam!

Kristian kaj Erik.



# SUBTERA SUPRO



Ĉiu vojaĝo havas siajn suprajn punktojn, neforgeseblajn lokojn. Ni venis al tia supra punkto kiam ni suriris la trajnon, kiu kunprenis nin subteren en la groton de Postojna. Ni sidis tie, ne en iu vagono, sed sur transportilo sen iu ajn kovrilo aŭ ŝirmilo, kaj mi ne povis ne denki al "simila" trajno en amuzejoj: Tie oni veturas en la mallumon, kaj subite aperas antaŭ ni en subita lumo iu teruraĵo. Ĉi tie la malo: En la lumigitaj punktoj vidiĝis al ni ĉiam nova belaĵo, artaĵo kreita ne de artisto homa, sed de la neimitebla Kreanto mem.
Ni do estis en Jugoslavio, kaj veturis laŭ la vojo inter Ljubljana kaj Rijeka, kiam ni venis al la fama loko kun grotoj, kiujn vizitis jam 20 000 000 homoj. Oni komprenebla sciis pri tiuj grotoj jam tre frue. La unuaj priskriboj datiĝas al la 17.a jarcento, kaj ek de la komenco de la 19.a jarcento oni vizitis ilin - kvankam ili estis senlumaj kaj estis neniu gvidanto. En 1818 gvidanto pro la imperiestro grimpis la muron de la "Granda Halo" kaj malkovris tiel daŭrigon nekonatan, kaj vokis: "Estas nova mondo ĉi tie, vera paradizo". Kaj jen la turismo vere komenciĝis.
La trajno prenis nin al sia fina stacio, de kie ni promenis piede. Grandaj ŝildoj anoncis lingvon de la gvidantoj, kaj ni (duope) elektis la angle parolantan. Kaj ŝi ekiris kun ni - pluraj angleparolantoj ne venis!
Je ĉiu turno de la piedvojeto aperis nova artaĵo. Kalkenhava akvo gute falas de la plafono de la groto, kaj kie ĝi falas postlasas mikroskopan restaĵon el kalko, kaj tiel konstruas dum jarmiloj la kolumnojn kun ties fantazio-reliefoj. Kelkfoje la gutoj sekiĝas jam antaŭ falo, kaj de la plafono pendas aliajn, simile belajn kolumnojn. Ie estis tiom en la supro, kaj kun tia delikateco, ke oni donis al la loko nomon: Spageta halo.
Parto de la groto nomiĝas "Nigra groto". La muroj, plafono kaj planko nigriĝis, ĉar partisanoj dum la milito sabote fajrigis grandan germanan oleo-

rezervon tie. Sed ne longe for estas la Neĝa Urbo - kun tia nomo pro la neĝe blankaj stalaktitoj, kaj aliloke estas la Kurteno - kelkmilimetra vualo kiu spegulas ĉiajn kolorojn kiel spektro sur la ĉielo.

Dum ni promenas, ni pasas laù la Rusa Ponto - ponto super abismo, ponto konstruita de rusaj militkaptitoj dum la unua mondmilito, kaj venas al Nica Galerio, kies marmoro brilas en ĉiaj koloroj, kaj baldaù venas al la granda stalagmito "Brilliant", kiu iĝis simbolo de la tutaj kavernoj.

Oni havas pruvojn, ke la ŝtonaĝa homo vivis ĉi tie, en la kavernoj. Oni trovis ostojn de urso el la glacia periodo. Sed eĉ nun estas vivaj estaĵoj ĉi tie: La Homa Fiŝo, Proteus anginus. Tiu estas amfibia kreitaĵo kiu nur vivas en la akvoj de Dinaric Karst, kaj ricevis sian nomon pro la haùto, kiu similas al la homa. Ĝi estas tute blinda sed perceptas la lumon per la haùto. Krome estas specialaj insektoj araneoj ktp, kiuj ĉiu evoluis tute unikajn specojn.



La fiŝojn vi povas vidi en bazeno - kaj post novaj 50 metroj vi estas en la Koncerta Halo, preksaù 40 m alta, kie povas esti samtempe ĝis 10 000 personoj. Ĉi tie oni arangas de tempo al tempo koncertojn, kaj laùdire la akustiko estas tute bona.

Ĉi tie estas homkreitaĵoj: Poŝtoficejo, vendobudoj de suveniroj kaj refreŝigoj. Kaj nur unusola granda stalagmito - la Strigo, kiu vere similas strigon.

Tiel finiĝas aventura vizito, dum kiu oni promenas ĉ 5 km sub la tero. Tio tamen estas nur malgranda parto de la grota sistemo, kaj abundo da neviditaj mirakloj restas.

Sed la homa menso jam estas superplena de impresoj, kaj oni havas nur la deziron ke la menso fotografie povus memori ĉion. Kaj tutcerte - tiu kiu iam vizitis la grotojn kaj ties belaĵojn, certe ĉiam emos iam tien reveni.

# INTERNACIA LINGVO por komputiloj

Oni diras, ke ĉie en la mondo oni parolas la anglan lingvon. Tamen, vi certe scias, ke ekzistas grandaj diferencoj inter la 'ununura' angla lingvo, kiam ĝi estas parolata en Britujo, en Usono, en Aùstralio, por ne paroli pri la diversaj specoj de tiu lingvo en Afriko kaj Azio.

Simila situacio ekzistas ĉe la malgrandaj komputiloj, kiuj nuntempe tiel forte penetras en nian socion. Ĉiuj *parolas* la saman lingvon: Basic. Tamen, malgraù tio, ĉiu el ili *parolas* sian propran dialekton, tiel, ke ili eĉ ne povas kompreni unu la alian.

Por tiu problemo tamen ekzistas solvo, kiun oni evoluis en Nederlando. En 1978 oni tie komencis radio-programon pri komputiloj sub la nomo HOBBYSCOOP, kaj oni volis dissendi programojn por komputiloj.

Pro la diversaj dialektoj de Basic oni devis elsendi la saman programon plurfoje, aù simple sendis en ĉiu semajno iun programon por alia speco de komputilo.

Tiam la nederlanda radio-amatoro Klaas Robers eltrovis "internacian lingvon" por komputiloj: "Basicode".

La uzantoj de la programo unue bezonas specialan programon por "akcepti" kaj poste "traduki" la dissenditajn programojn. Per tiu traduk-programo ili povas grandparte ŝanĝi la Basicode-programojn tiel, ke ĝi estas uzebla en la propra komputilo. En kelkaj esceptaj kazoj iuj ŝanĝoj "permane" estas necesaj. Nun oni do povas ĉiusemajne ricevi novan programon per la simpla registrado de kelkminuta radioprogramo sur son-kaseto. Per la tutmonda servo de la nederlanda radio (Wereldomroep) la programoj nun ankaù atingas al centoj da radiostacioj en Ameriko, Aùstralio kaj Nov-Zelando. La brita radio BBC eldonos manlibron pri Basicode por siaj aùskultantoj, kaj ankaù en Aùstrio oni intencas dissendojn en tiu komputila kodo.



Se vi interesiĝas, skribu al: NOS, Hobbyscoop, Postbus 1200, 1200 BE HILVERSUM, Nederlando.

Precipe kiam vi vivas en lando kiu ne estas angla-lingva, mi tre ŝatus ke vi skribu en Esperanto, minimume ke vi Mencias nian lingvon en via letero.

Komputiloj kiuj *komprenas* programojn

en la Basicode-kodo estas i.a: Apple kaj IIe / BBC modeloj A kaj B / Colour Genie / la Commodore-komputiloj / CP/M sistemoj / Exidy Sorcerer / MFP II / New Brain / Philips P 2000 / Sharp MZ 870 A, B, K / Sinclair ZX81 kaj Spectrum / TRS modeloj I kaj III.

Kiam nova tradukprogramo estas preta, oni dissendas ĝin per la radio. La programoj kiuj jam ekzistas estas aĉeteblaj per son-kaseto kun klariga manlibro. Kune ili kostas Ned. gld. 30.-, sed kompreneble vi pli bone povas "prunti" ĝin de konatulo, kiu ĝin jam posedas. Kaj ĉar la aŭskultantoj de la Hobbyscoop-elsendoj senpage disponigas siajn programojn por ĉiu, ĉiu havas la rajton kopii ilin laŭplaĉe. Ko.

---

La Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informatiko kaj Sistemiko (TAKIS) okazigos sian unuan universalan kongreson kun la nomo INTERKIBERNETIK en Budapeŝto de la 27.a de julio ĝis la 2.a de augusto 1985. La uzantoj de komputiloj tie havas eblecon aŭskulti al diversaj prelegoj.

---

# LIBROJ

Ken Keyes jr: La centa simio.

La libro origine estas nederlandlingva, se la 73-jara s-ino Naber-Keller, kiu eklernis nian lingvon antaŭ du jaroj, tradukis ĝin. Tio kreis ioman atenton en gazetoj, kaj "reklamas" nian lingvon.
La temo de la libro estas la kontraŭstaro al nukleaj armiloj.
La titolon ĝi trovis en scienca eksperimento, dum kiu oni povis rigardi kiel simioj iom post iom lernis ian "kulturan" aktivadon.
Kaj la espero de la libro estas, ke ankaŭ homoj iom post iom lernas rigardi aliajn homojn ne kiel "malamikoj" sed kiel kunhomoj, eĉ se ili havas aliajn opiniojn.

Nederlando koncize.

La Oficejo por Informaj Publikaĵoj de la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj eldonis ĉi tiun 56-paĝan, belan, multkoloran broŝuron kun abundo da utilaj informoj pri historio, politiko, ekonomio, geografio (i.a. pri la paca pligrandigo de la landa teritorio!) kaj turismo. La kajero malkovras distingon inter turistoj: tiuj el Nord-Ameriko kaj Japanujo povas havigi al si "Nederlandan Kulturan Karton" kiu rajtigas al nombro da kulturaj privilegioj - krom amplekssan informan dosieron. Espereble ankaŭ aliaj povos estonte havigi al si tiun karton!
La kajero estas kaj bela, utila kaj interesa!

# Ĵetado





Skoltoj konas la longan ŝnuron kun alfiksita poŝo enhavanta metalpecetojn. Ili lernis ĵeti ĝin. Iam tio povas savi vivon. Sed se la ĵetado povu esti vivsava, oni devas scii ĵeti eĉ se oni kuŝas sur nesekura glacio aŭ se oni sidas en malgranda boato. Kaj tamen trafi. Tial praktikado estas necesa. Eble eĉ per ŝnuro sen la peza poŝo. Tio eblas - sed per alia tekniko:
Metu la ŝnuron super la maldekstra sub-brako, prenu triononde la snuro (en belaj turnoj!) per la dekstra kaj ĵetu dum vi per la maldekstra brako kaj mano montras rekte al la celo.

Oni ankaŭ devas scii kiel konservi sian ĵetŝnuron: Neniam formetu malsekan ŝnuron, ĝi putros; kaj neniam lasu nodojn sur ĝi, ŝnuro kun unu ordinara nodo havas nur la duonan fortikon.


Dum vi kaj viaj kunskoltoj deziras praktiki, vi povas fari diversajn celojn por la ĵetado - kiel ekzemple:





Por konkursoj estas praktike fari konkursovojon kun diversaj celoj por la ĵetado. Memoru, ke la diversaj celoj devas esti el pluraj tipoj, tiel ke oni devas praktiki ĉiajn formojn por ĵetado, ankaŭ kuŝante. Kaj ĉiu devas trafi antaŭ ol kuri pluen. Kiu trapasos la tutan vojon dum plej mallonga tempo?



Vi povas fari variaĵon de tio, la ĵetada golfo. Tiu, kiu trapasas la tutan vojon uzante pli malmulte da ĵetoj, venkas.



Tria ebleco de praktikado estas la maniero kiun ni montras supre: Ĵetu la ŝnuron kiel "vivsava pomo". Unue metu la ŝnuron per nodo kiel sur la ilustraĵo sur vian brakon. Turnu la reston de la ŝnuro ĉirkaù via mano por tiel krei la "pomon". Tiam prenu la "pomon" per via dekstra mano kaj ĵetu ĝin al la celo.

Decas havi regulojn per kiuj vi povas juste aljuĝi poentojn. Kaj tutcerte via roto havos gajan, liberaeran kunvenon dum la praktikado.


# Vizitu Landskrona

.....la ĉarman apudmaran urbeton kun la insulo Hven en suda Svedujo



Eblas aranĝi senkostan loĝadon.
Antaù via alveno kontaktu: NILS ALVAR EKSTEN (Box 4050, S-261 04 Landskrona) vendiston de senimpostaj varoj por hejmo, aùto, boato, entrepreno, klubo ktp.
Ĉiuj geskoltamikoj estas ĉiam tre bonvenaj al mia hejmo, urbo kaj lando dum 1985.

# KORESPONDU!

Scott Loewencamp, 17.jara (insignoj, ŝatas labori pri ligno) 5503 West 25th Street, Kennewick, Wa 99336 Usono.

Chris Black, 17.jara (sportoj: teniso, skiado) 809 West 14th Place, Kennewick, Wa 99336

Curt Davis, 14.jara (fiŝkaptado, ĉasado, Piedmigrado) 1423 Marshall, Richland, Wa 99352 Usono.

Pascal Poumailloux, 30.jara skoltestro (sk. gazetoj, libroj insignoj) 37 allée des Grands Clos, F 78590 Noisy le Roi

Laurent Sambou, 20.jara (fotografado, insignoj, lernis Esp. per kor.kurso kaj dez. utiligi ĝin). Scout á la Cathédrale St.Antoine de Padoue, Box Postale 23, Ziginchon, Sénégal.

Usonaj skoltinoj 13-15-jaraj serĉas kor.amikinojn. Skoltestrino: Nancy Hattaway, 1185 Meadow Lane 114, Concord, Ca 94520, Usono.

Esp.grupo "Amikeco", junuloj kiuj klopodas konservi sk.idealojn. Gvidanto: Tadeusz Goebel, ul Kosciuszki nr 13, PL 89 300 Wyrzysk

Luis Gilperez des. kor. kun Iamaj Skoltoj por krei Internacian Gildo de Iamaj Geskoltoj ene de SEL. Adreso: Apartado Postal 7131, Sevilla, Hispanujo.

Ts. Batzaya, 19.jara (Scienc-fikcio, naturscienco, Biologio, Astronomio ktp. Dez. kleriĝi en la angla lingvo) Adreso: ULAN-BATOR, Central Post, poste restante, Mongolio, Sovetunio

Adriana Krolitawska, 14.jara knabino kaj Darius Krolitawska, 16.jara knabo. Ambaŭ Dembavskiego 7/27, PL 38 500 Sanok, Pollando

Mariola Katerina Starczewska, 20.jara (skolta kaj junulara movadoj, porcelano, libroj, kudrado. Str Bohateroe 29, PL 89 333 Osiek n/ Not., Pollando

U. Zeiter Perera serĉ. kor. por skoltoj de lernejo por surdmutuloj. (p.markoj, bildkartoj, sporto, skolta vivo, ĉefe amikeco). Adreso St. Josephs Scouts troup, St. J. Schoo. for deaf and dumb, 197 Indivitiya Rd, Hettigama, JA ELA SI, Ragama, Sri Lanka.

Jennifer Dimo, gvidantino de lupidoj, dez. interŝ. broditajn naciajn skoltemblemojn. Adr: 9 Rocky Gully Rd, Coominya 4305. Australio.



SKOLTA ESPERANTO - LIGO en SVEDIO
Scouternas Esperanto Förbund i Sverige
Pg. / Poŝtĉeka Konto 477 49 83 - 3

LA SVEDA S.E.L. HELPAGADOJ
Svenska S.E.L:s Hjälpverksamheter
Pg. / Poŝtĉeka Konto 10 90 50 - 5

La Kasisto/Kassören NILS ALVAR EKSTÉN
P.O. Postbox / Poŝtkesto 4050
S - 261 04 LANDSKRONA 4.
Sverige / Svedujo

Telf. / Telefono 0418 - 282 28

La Membrokotizo 35 Svedaj Kronoj JARE inkluzivas La Gazeton "LA SKOLTA MONDO" kvar numerojn Jare.

NE - Svedaj Geskoltoj kaj S.E.L. membroj sin TURNU al Ĝenerala Sekretario J.K. Hammer Internacia SKOLTA ESPERANTO-LIGO Poŝtkesto 433 NL-1500 EK ZAANDAM. Nederlando. aŭ al Sveda Kasisto Nils Alvar Ekstén
Ĉiuj Geskoltoj en La Mondo PAGU Kvarono (1/4 parto) de U.E.A. kotizo MJ(-K) 1985.

MEDLEMSAVGIFTEN är 35:- per År & Person, & MAX 100:- för hel FAMILJ oavsett medlemsantal i Familjen inkl. Tidningen SCOUT VÄRLDEN 4 nummer per år.
Medlemmarna får 10 öres återbäring på DRIVMEDEL per liter inköpt BENSIN o.s.v. via GULF som MEDLEMSFÖRMÅN, 8 öre per liter tillfaller vårt HJÄLPARBETE.

DONACOJ al la MALRIĈAJ GESKOLTOAMIKOJ tra La Sveda S.E.L. Helpagadoj.
Per viaj DONACOJ do ni povas HELPI ĉiujn GESKOLTOAMIKOJN en la MONDO.

Gåvor till Fattiga Scoutvänner genom Svenska S.E.L:s Hjälpverksamheter.
Genom dina gåvor så kan vi HJÄLPA alla SCOUTVÄNNER i Världen.

S.E.L. kaj SKOLTA SALUTOJ al ĉiuj GEAMIKOJ en la MONDO de via Sveda S.E.L. Amiko

S.E.L. & SCOUTHÄLSNINGAR till er alla Vänner i Världen ifrån era Svenska S.E.L. Vän

NILS ALVAR La Esplorrigardanto EKSTÉN
Spejaren